

Joseph M. Scriven ,  
Trans imag' Jesu' amikas

*tradukita de Reinhard Pflüger*

Trans imag' Jesu' amikas -  
kia la privilegi',  
ke li portas nian ŝuldon.  
Preĝe donu ĝin al li.  
Kiom ni disipas ŝancojn  
pri anima harmoni',  
sole ĉar ni rezignadas  
preĝe turni nin al li.

En danĝero kaj aflikto,  
tento kaj eĉ tragedi'  
ni neniam malesperu.  
Preĝe prenu ĝin al li,  
la fidela akompano.  
Amikec' ne eblas pli.  
Konas li malforton ĉian,  
preĝe portu ĝin al li.

Zorgoŝarĝo ofte pezas,  
kaj senfina la defi'.  
Ĉion la Savant' superas.  
Preĝe fuĝu ni al li.  
Se forturnas sin amikoj,  
preĝe diru ĝin al li.  
Vin konsole ĉirkaŭbrakos  
la Unika sen kopi'.

...

Vi, Savant', promesis porti  
ŝarĝojn niajn tie ĉi.  
Tial ilin ni demetu  
ĉiujn preĝe nur ĉe vi.  
Baldaŭ preĝoj ne necesos  
ĉe la brila tron' de Di'.  
Ĝis etern' ni restos rave  
en ador' kaj laŭd' al Li.

*Traduko de la Angla poemo "What a Friend We Have in Jesus" de JOSEPH M. SCRIVEN (\*1820 – †1886) en Esperanton de Reinhard Pflüger en 2006-08.*

*Arg-372-732 (2008-03-30 23:14:41)*

*Tiu ĉi Esperantigo aperis en la numero 4/2006 de la organo de Kristana Esperanto-Ligo (KELI), en Aŭgusto de 2006.*